# STARTO

## N-ro 4/2005 (217)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



# Nova estraro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

*starantoj*: Petr Chrdle, Věra Podhradská, Jana Melichárková, Vratislav Hirš, Pavel Polnický
*kaŭrantoj*: Miroslav Vaněk, Jiří Tomeček

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 10 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte),

**rete Starto:** malovec@volny.cz,

**rete ĈEA:**

cea.polnicky@quick.cz (sekretario)

melicharkova@quick. cz (prezidanto)

www.esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, D 500 Kč, Z 1000 Kč, Starto-abono 200 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 600 Kč komencantoj, 700 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz

**Libroservo:** c/o Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, pri informadiko

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia, gazetara-informa

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz

**IČO de ĈEA:** 00 44 30 34

GRAVA INFORMO!!!

**NOVA BANKO-KONTO de ĈEA:**

195 230 825 / 0300

Poštovní spořitelna Poděbrady

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**

**Komitato de ĈEA:**

**Prezidanto:** Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz (reprezentace ČES, koordinace, vnitřní vztahy, metodika)

**Vicprezidanto (komitatano A de UEA)**: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, fakso 257 712 126 chrdle@kava-pech.cz (mezinárodní vztahy, odborná aplikace esperanta, vydavatelská činnost, EU, retkomunikoj)

**Vicprezidanto:** Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, 602 611 584, jirka.tomecek@post.cz (muzeum)

**Sekretario**: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel./fax. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz (sekretariát, členská základna, účetnictví)

**Kasisto:** Vratislav Hirš, 683 06 Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 385 367, hirs@gm.vyskov.cz

**Komitatano:** Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 543 233 047, podhradska@volny.cz (kluby, konference, zápisy, čestní členové)

**Komitatano:** Miroslav Vaněk, 507 44 Libošovice 104, vanekmi@centrum.cz, (sekce, komise)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:** Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. č. 1, 130 00 Praha 3, tel. 603 444 828

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Prezidanto: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, josef-hron@volny.cz, tel. 466 401 942;

Věra Štěpánová, Jana Zajíce 2873/22, 400 11 Ústí n. L., slaharova.v@kr-ustecky.cz;

Jiří Souček, Mečislavova 223/8, 140 00 Praha 4, soucek@pcp.lf3.cuni.cz

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 547 240 690, malovec@volny.cz, malovec@chello.cz

**Kontrollegis:** P. Polnický, V. Kočvara, M. Pastrňák

**Gazetara-informa komisiono:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, CejkovaJarka@seznam.cz

# 11-a kongreso de ĈEA

En la tagoj 21.-23. 10. 2005 en la hotelo Dukla de Vyškov kunvenis cento da asocianoj, por pritaksi sian laboron dum la pasinta periodo kaj por elekti novan komitaton.

Vendredo estis alvetura tago, tamen jam antaŭvespere la kongresanoj vizitis lokan Bibliotekon de Karel Dvořáček, kie estis instalita Esperanto-ekspozicieto en la koridoro de la dua etaĝo. La direktoro D-ro Vladislav Raška persone ĉiĉeronis, priskribis la historion de la domo, montris la mezepokan puton en la vestiblo, prezentis ĉiujn ĉambrojn kun prunteblaj libroj. Kaj precipe la biblioteko fieras pri siaj plej gloraj aŭtoroj, romanverkisto Karel Dvořáček (1911-1945) kaj arabisto Alois Musil (1866-1944), kies aventuraj libroj por junularo popularigas la araban kulturon, sed lia ĉefa signifo estas en sciencaj verkoj.



Ekspozicio en la biblioteko

Post la vespermanĝo estis projekciataj fotoj el la kongresoj en Vilno kaj Zakopane kun komento de junulo Marek Blahuš, poste oni povis ĝui kelkajn lecionojn el la videokurso *Pasporto al la tuta mondo*.

La ĉefa kongresa traktado okazis sabate antaŭtagmeze. La programon inaŭguris koncerto de la loka infankoruso *Motýlek,* V. Hirš diris kelkajn vortojn pri Vyškov kaj la ĉeestantoj omaĝis per minuto da silento al la forpasintoj.


Infangrupo Motýlek

La kunvenon gvidis J. Tomeček. Unue li transdonis la vorton al P. Chrdle, kiu informis, kiel estis plenumita rezolucio de la pasinta kongreso. Sekvis preskaŭ unuhora raporto de la prezidantino V. Podhradská pri la laboro de nia asocio dum la lastaj tri jaroj, sekretario P. Polnický prezentis situacion financan kaj pri la membrobazo, J. Hron koncize informis pri la agado de kontrolgrupo.



La kulmino de la antaŭtagmeza programo estis elekto de novaj honoraj membroj de ĈEA: **Josef Hron, Ludvík Chytil, Zdenka Novotná, Jindřich Ondráček, Bohuslava Pelclová, Miloslav Šváček**.



Novaj honoraj membroj de ĈEA

En diskuto J. Příborský salutis la kongreson nome de la blindula sekcio, Dáša Chvátalová kaj Marek Blahuš prezentis novan asocion de la ĉeĥa Esperanto-junularo, M. Vaněk prezentis enketon de opinioj pri nia asocio, P. Chrdle atentigis pri la monkolekto por monumento omaĝe al Milan Zvara. Pri la agadoj de IKUE kaj IFEF raportis M. Šváček kaj J. Tomíšek.

La prezidanto de la elekta komisiono K. Janík disdonis balot-biletojn kun nomoj de kandidatoj por la nova asocia komitato kaj la kongresanoj havis preskaŭ tutan posttagmezon por pripensi sian elekton.

Post tagmanĝo la kongresanoj en du grupoj gvidataj de J. Vojáček kaj V. Hirš promenis tra Vyškov, vizitis la urban muzeon kaj je la 16-a horo ili jam denove sidis en la kongresa salono por partopreni la balotadon. Ĉiuj kandidatoj estis prezentitaj, poste la kongresanoj ĵetis balotilojn en balotujon.

La rezultoj de la balotado estis prezentitaj post vespermanĝo antaŭ la tradicia dancamuzo kun tombolo, kiun sprite gvidis Kvido Janík. Samtempe okazis la unua kunsido de la nova komitato.

Kun la disdivido de la funkcioj estis la kongresanoj konatigitaj dimanĉe antaŭtagmeze: **Jana Melichárková** (prezidanto), **Petr Chrdle** (vicprezidanto kaj eksteraj rilatoj), **Jiří Tomeček** (vicprezidanto), **Pavel Polnický** (sekretario), **Vratislav Hirš** (kasisto), **Věra Podhradská** (kluboj, konferencoj), **Miroslav Vaněk** (sekcioj, komisionoj). La kontrolgrupo estis reelektita: **Josef Hron** (prezidanto), **Věra Štěpánová, Jiří Souček** (membroj).

Josef Hron klarigis, kial ne realiĝis esperantlingva traduko de la Eŭropa konstitucio, poste sekvis riĉa ĝenerala diskutado pri lerniloj, legolibroj kaj propagandiloj, pri esperantlingvaj retaj paĝoj kaj prospektoj de niaj urboj, pri informado en la gazetaro kaj pri laboro kun infanoj kaj studentoj. Fine P. Chrdle tralegis la kongresan rezolucion, kiu estis akceptita. La nova prezidantino dankis la ĉeestantojn kaj speciale la organizantojn kaj fermis la kongreson.

Dum la kongreso funkciis ankaŭ Libroservo sub zorgo de Z. Pluhař kaj estis prezentitaj novaj libroj (Taglibro de mia frato, Heroo de amo, Zamenhofova ulice).

*mm*

# REZOLUCIO

La 11-a kongreso de ĈEA, okazinta en Vyškov de la 21-a ĝis la 23-a de oktobro 2005,

aprobas

1-e raporton pri la agado de ĈEA, raporton pri la mastrumado kaj raporton de la Kontrolgrupo inter la 10-a kaj 11-a kongresoj

2-e komitatanojn pro la funkciperiodo 2005 – 2008: Vratislav Hirš, Petr Chrdle, Jana Melichárková, Věra Podhradská, Pavel Polnický, Jiří Tomeček kaj Miroslav Vaněk

3-e la Kontrolgrupon: Josef Hron, Jiří Souček kaj Věra Štěpánová

4-e la proponon de la Kontrolgrupo enkonduki bazan kotizon por la dumvivaj membroj de ĈEA, ekz. 100,- Kč/jaro

5-e atribuas honoran membrecon al s-anoj: Josef Hron, Ludvík Chytil, Zdeňka Novotná, Jindřich Ondráček, Bohuslava Pelclová kaj Miloslav Šváček

taskas

1-e al la komitato de ĈEA realigi la proponon de la Kontrolgrupo enkonduki bazan kotizon ankaŭ por la dumvivaj membroj de ĈEA

2-e al la komitato de ĈEA teni regulajn kontaktojn kun la ceteraj memstaraj Esperanto-organizaĵoj en Ĉeĥio, precipe kun la nove fondita Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ)

3-e al la komitato de ĈEA plivigligi la rilaton al EEU kaj laŭeble enkonduki libervolan kotizon por la aktivecoj de ĈEA enkadre de EEU

4-e al la komitato de ĈEA transdoni la kolektitan monon 1 500,- Kč nome de la kongreso al la komisiono por starigo de la monumento de Milan Zvara en Poprad

5-e al la komitato de ĈEA pli atenti la lingvan nivelon de oficialaj Esperantaj tekstoj (ankaŭ en Interreto)

6-e al la membroj de ĈEA pli aktive klarigadi en sia ĉirkaŭaĵo la eblojn de Esperanto en la informado pri instancoj, urboj, regionoj, organizaĵoj ktp.

# Internacia Paroliga Semajno

Inter la 10-a kaj 16-a de oktobro 2005 realiĝis en Dobřichovice konversaciaj kursoj, kies etoson plej bone esprimas fotoj.



# Plenumo de la laborplano 2002-2005

Raporto de Věra Podhradská



aliaj niaj retejoj, precipe al la paĝoj de nia junularo, kiujn prizorgas Marek Blahuš kaj Tomáš Břicháček. Per tio estis ankaŭ plenumita la unua punkto de Laborplano el la pasinta kongreso. En la domajno oni povas trovi ankaŭ mapon de Ĉeĥio kun indikoj pri niaj kluboj. Kelkaj kluboj havas ankaŭ siajn proprajn retejojn: Brno, Mladá Boleslav, tendaro en Lančov, Pardubice, Přerov, Příbram, Svitavy, Strážnice. El sekcioj havas siajn paĝojn IKUE, sekcio de Informadiko, Sekcio de Junularo kaj la Pedagogia Komisiono. Ankaŭ la memstara asocio AEH havas sian retan prezentiĝon.

Alia punkto estis krei Esperantlingvajn retajn paĝojn de ĉeĥaj urboj. Nove sukcesis Viktor Dvořák ĉe oficialaj retaj paĝoj de Moravské Budějovice (kun traduko de Zdeněk Hršel) kaj Margit Turková ĉe oficialaj paĝoj de Příbram. La magistrato de M. Budějovice volas kunlabori kun nia asocio kaj ligi kontaktojn kun novaj partneraj urboj en la mondo pere de Esperanto. El pli frua tempo ekzistas paĝoj pri Most, Svatý Jan pod Skalou, Muzeo de Šumava, Helštýn, Hostýn kaj Psikiatrio en Kroměříž. Oficialaj paĝoj de Pardubice kaj Strážnice informas pri la loka Esperanto-movado. Informon pri preskaŭ ducent ĉeĥaj urboj enmetis en la retan enciklopedion

## Esperanto kaj interreto

La 26-an de septembro 2005, en la Tago de Eŭropaj Lingvoj, publikigis japana esperantisto Etsuo Miyoshi en multaj eŭropaj lingvoj tutpaĝan anoncon pri Esperanto - nialande ĝi aperis en Právo kun referenco al nia reta domajno. Tial ni klopodis aktualigi la domajnon antaŭ tiu ĉi dato. La domajnon administras Aleš Tomeček el České Budějovice, li donis al ĝi novan dezajnon, konektis ĝin per ligoj al

Vikipedio Petr Tomašovský el Hlučín, kiu apartenas al la plej aktivaj kontribuantoj al la enciklopedio entute. Li aldonis informojn ankaŭ pri niaj historiaj regantoj, aktoroj k.s., sekve apenaŭ iu alia lando en la interreto disponigas tiom da informoj en Esperanto kiel Ĉeĥio.

Miroslav Malovec enmetis en Vikipedion ĉiujn informojn el Enciklopedio de Esperanto el la jaro 1935, por ebligi aktualigon de ĉiuj artikoloj pri nia tutmonda movado, kaj aldonis artikolojn pri kelkaj ĉeĥaj verkistoj. Ceteraj niaj kontribuantoj al Vikipedio estas Marek Blahuš, Jan Pospíšil, Dimitri Loverman kaj Vít Zvánovec.

En la reto estas publikigataj ankaŭ gazetoj Starto, Dio Benu, Informilo de AEH kaj Aŭroro, nove aperas ankaŭ protokoloj el la komitataj kunvenoj, asocia statuto kaj aliaj dokumentoj. Tri niaj plej grandaj bibliotekoj (ČES, Česká Třebová, Brno) kaj Libroservo estas troveblaj en la reto. Atingeblaj estas ankaŭ kvar kursoj de Esperanto en la ĉeĥa lingvo. Personoj, kiuj estas atingeblaj rete, ricevas ankaŭ tiel nomatajn Retajn Komunikojn de ĈEA, kie estas aktualaĵoj pli rapide anoncataj ol en presataj informiloj.

Brno havas en la interreto urban enciklopedion, kien la lokaj esperantistoj sendis kontribuojn pri siaj eminentuloj (Scheiber, Vondroušek, Šikula, Krchňák) kaj pri kelkaj eventoj (fondo de la klubo, Verda Stacio, Konstitucia kongreso de ĈEA). La kontribuoj estis akceptitaj kaj publikigitaj. Prof. Novobilský kompletigis informojn pri sia patro, kiun tribunalo en Brno kondamnis al morto dum la okupacio.

En Přerov estis pro meritoj pri la propagando de la urbo per Esperanto honorigita Ludvík Chytil per medalo J. A. Komenský - la informo estas publikigita en la reto en la urba informilo.

En la reto troviĝas kompreneble ankaŭ vico da eksterlandaj Esperanto-retejoj. La brazila paĝo, nomata Ĝangalo, alportas ĉiutage raportojn pri politikaj kaj aliaj eventoj en la mondo, ĉiutage ĝin vizitas 3500 homoj. Ĝangalo preparas ankaŭ projekton de esperantlingva televido, la priskribo de la projekto ekzistas en 12 lingvoj inkluzive de la ĉea (ni ne scias, kiu tradukis). La retejo NUN alportis interesaĵojn el Esperantujo, kiujn la homoj mem enmetis. La retejo *Esperanta literaturo en la reto* kolektas informojn pri ĉiuj beletraj Esperanto-tekstoj, kiujn esperantistoj en la tuta mondo publikigis en la reto. Per klako de muso vi povas malfermi kaj legi ĉiun el la tekstoj, do ĝi impresas kiel reta biblioteko plena de libroj,

ekde poemoj ĝis romanoj. Per musoklako vi povas malfermi informejon pri la originaj Esperanto-verkistoj (en niaj retejoj ankaŭ ĉeĥlingve).

Nun ekzistas en la tutmonda reto pluraj miloj da Esperanto-prezentiĝoj, precipe de UEA, landaj kaj fakaj asocioj, Akademio de Esperanto, unuopaj kluboj, ankaŭ kursoj, vortaroj, enciklopedioj kaj literaturo, fine ankaŭ gazetaj artikoloj kun mencio pri Esperanto. Interretaj serĉiloj trovas ĉirkaŭ 100 milionojn da lokoj kun la vorto Esperanto. Troveblaj estas ankaŭ profesiaj firmaoj, kiuj uzas Esperanton (KAVA-PECH, Penziono Espero) aŭ kiuj nomiĝas Esperanto (kafejo Esperanto en Frýdek-Místek), multaj hoteloj Esperanto en la mondo. En Mladá Boleslav aktivas firmao Esperanto s.r.o., kiu liveras tenilojn por freziloj kaj torniloj, en Uherský Brod kantas infana koruso Esperanto.




**Sekcioj**

Membroj de ĈEA grupiĝas laŭ siaj interesoj en diversaj sekcioj. Ni havas sekciojn tre aktivajn, kiuj eldonas informilojn por siaj membroj, organizas renkontojn kaj aktive partoprenas agadon de internaciaj organizoj. Al la plej aktivaj apartenas la katolika sekcio kaj sekcio de blinduloj, same kiel la memstariĝinta asocio de handikapuloj.

Per riĉa agado povas fieri ankaŭ sekcio de fervojistoj kaj sekcio kristana. Sian agadon disvolvas ankaŭ sekcio de informadiko, fondita antaŭ tri jaroj en la pasinta kongreso.

Post jaroj de klopodado pri restarigo de junulara sekcio formiĝis ĉijare memstara organizo de la Ĉeĥa Esperanto-Junularo. Unu el la motivoj de la memstareco estas espero ĉerpi subtenojn el junularaj fondusoj, kiujn nia asocio apenaŭ ricevus.

Apud la menciitaj sekcioj ekzistas en nia asocio ankaŭ sekcioj pasivaj, kiujn iniciatis unuopuloj, sed ne trovis daŭrigantojn. La komitato klopodis helpi al funkciuloj revivigi la agadon, sed la komitato ne povas krei sekcian programon nek laborplanon. Laŭ la Statuto sekciojn formas asocianoj de simila intereso, sed se la intereso forvelkis, ne havas sencon teni la sekcion formale.

La asocia komitato decidis nuligi la sekcion de SAT-amikoj, kiu lastfoje montris vivon en 2001, kaj skoltan sekcion, ĉar ankaŭ ĝi dum pluraj jaroj ne laboris.

La pedagogia sekcio estis ŝanĝita je pedagogia komisiono, ĉar ligi kontaktojn kun ILEI por la asocio tre gravas.

Ni alparolis funkciulojn de la medicina sekcio kaj de la ŝaka sekcio, sed kiel jam estis dirite, la aktiveco devas veni de la sekcianoj.

**Gazetara kaj informa komisiono**

Post la forpasinta Drahoš Kočvara ekzorgis pri la kolektado de gazetaj eltondaĵoj Jarka Čejková kaj senlace kolektas artikolojn en la ĉeĥaj amaskomunikiloj pri ideo de internacia lingvo kaj pri Esperanto-movado. Kelkajn el la artikoloj oni povas trovi en nia interreta domajno.

Aŭtoroj de la kontribuoj aŭ iliaj iniciatintoj estas kutime esperantistoj, niaj asocianoj. Gazetaro bezonas impulson, kia estis ekzemple la tutpaĝa intervjuo kun la japana esperantisto Etsuo Miyoshi en la ĵurnalo Právo aŭ apero de nia poetino Eli Urbanová en televidaj programoj Velký vůz kaj Barvy života aŭ de Jaroslav Suchánek en Radio Ostrava. Proklami sin publike esperantisto povas ĉiu el ni kaj ne bezonas temi nur pri amase spektataj televidaj programoj kiel Milionář, Riskuj kaj AZ kvíz, kie partoprenis ankaŭ niaj membroj, kiuj menciis Esperanton kiel sian hobion. Ĉu vi alparolis lokajn redakciojn okaze de la Tago de Eŭropaj Lingvoj la 26-an de septembro?

De tempo al tempo la redaktoroj mem alparolas niajn membrojn, ekzemple meze de aŭgusto la ĵurnalo Rovnost turniĝis al Miroslav Malovec kun kelkaj demandoj, kies respondoj poste aperis en formo de intervjuo. Tamen oni publikigis nur tion, kio koncernis la urbon Brno, ne ekzemple informon pri nia tendaro en Lančov. La redakcioj ĝenerale rifuzas artikolojn, kiuj propagandas Esperanton, sed interesiĝas pri artikoloj, ke pere de Esperanto estis propagandata ilia urbo aŭ regiono, ekzemple dum la universala kongreso.

Memstara ĉapitro povus esti klubaj bultenoj, informiloj kaj cirkuleroj, kiuj pro manko de mono kaj de volontuloj aperas ne regule kaj perdigas intereson de la membraro. Iomete povas helpi publikigado en la interreto, kvankam ne ĉiuj esperantistoj estas retanoj.

Kelkaj kluboj, sekcioj kaj bultenoj jam havas sian retan paĝon, al la ceteraj ni povas helpi, sed necesas

trovi iun respondeculon, kiu gardos aktualecon de la informoj, ĉar neaktualaj informoj malutilas anstataŭ propagandi. Se vi trovos paĝon kun ne plu validaj informoj, ne hezitu skribi al la aŭtoro. Ni vivas en la mondo de informoj kaj vi mem scias, kiel oni aprezas aktualan kaj precizan informon.

La konkurso pri la plej bela reta paĝo ne realiĝis, ĉar ni havis sufiĉe da laboro kun nia propra domajno, plie la paĝoj ankoraŭ ne estas sufiĉe multaj. La tasko do transiras al la venonta funkcia periodo.

En la reto estas alirebla kompleta lernolibro de Theodor Kilian, aktualigita de Dieter Berndt kaj Miroslav Malovec kaj transformita en retan kurson fare de sinjoro Zdeněk Maršík, kiu mem ne estas esperantisto, sed favoranto kaj bona komputilisto. Michal Balík, geedzoj Kareš kaj Josef Vojáček la unuopajn lecionojn laŭtlegas kaj la unuaj 14 lecionoj do estas disponeblaj ankaŭ en aŭdo-versio. Simile ni volus prilabori la korespondan kurson de Josef Cink.

## Starto

La presado de Starto estis transigita el Opava al Litomyšl kaj la lasta numero jam estis presita en Svitavy, kie inĝ. Dvořáková loĝas proksime de la presejo kaj povas pli helpoprete kunlabori. Ŝia propono enmeti en Starton aktualajn invitilojn por aranĝoj estis uzata nur sporade.

La redaktoro grupigas la kontribuojn ne laŭvice, kiel ili alvenis, sed laŭ parencaj temoj (klubaj raportoj, kondolencoj, aranĝoj, datrevenoj ktp.). Sed dum la laboro li ne scias, kiuj kontribuoj ankoraŭ venos ĝis la redaktofermo, pro tio ne ĉiuj artikoloj estas lokitaj tute logike, se ili venis lastmomente. Plej facile estas prilaborataj tiuj kontribuoj, kiujn li ricevis rete kaj Esperantlingve, sed li scias prilabori ankaŭ tiujn, kiuj venis surpapere kaj en la ĉeĥa lingvo. Laŭ la kodekso de redaktoro devus esti ĉiuj kontribuoj Esperantlingvaj. Escepton ni faras tiam, kiam ni turniĝas al komencantoj.

## Verkistoj

Bone funkcias kunlaboro kun la verkistinoj Věra Ludíková, Zdenka Bergrová kaj lastatempe ankaŭ Eva Kantůrková. Jiří Patera tradukas fabelojn de Z. Bergrová, jam forpasinta Jaroslav Mráz esperantigis tekstojn *Pošli to dál* (Sendu ĝin pluen) de V. Ludíková. Nun daŭrigas la laboron M. Malovec. En la lasta libro *Pošli to dál III* estis lia artikolo pri la Esperanta verkisto František Omelka kaj poemoj de Eli Urbanová, Zdenka Bergrová, Jiří Karen, Čestmír Vidman kaj Gerrit Berveling. La enkondukan tekston tradukis el Esperanto al la lingvo ewe Kokou Sagbadjelou, la prezidanto de togolandaj esperantistoj. M. Malovec prizorgas ankaŭ interretan paĝon, kie estas la nomitaj ĉeĥaj verkistoj prezentataj.

# El aktivadoj de la Katolika Sekcio

La nunjaraj aktivadoj de la Katolika Sekcio de ĈEA estis sufiĉe abundaj, kompreneble precipe por tiuj, kiuj ilin povis aktive partopreni.

Jam februare ekestis ebleco partopreni kristanan seminarion por esperantistoj en Strasburgo kun vizito de Eŭropa Parlamento kaj renkonto kun ties deputitoj. La sekcion dum la seminario reprezentis ĝiaj prezidanto Miloslav Šváček kaj vicprezidanto Ing. Jan Kalný, kiu tie prezentis tre interesan prelegon.

En la monato majo okazis du belaj aranĝoj. La unua estis tritaga renkonto de la sekcianoj en Česká Třebová, kadre de kiu okazis ankaŭ konferenco de la sekcio kun elekto de la sekcia komitato por trijara balotperiodo. La dua estis ankaŭ renkonto ne nur de la sekcianoj, sed ankaŭ de ekstendaranoj de la naŭ katolikaj E-tendaroj, okazintaj tiutempe preskaŭ mirakle en vilaĝeto Herbortice. Tridek ekstendaranoj renkontiĝis rekte sur la iama tendarejo, por kune rememorigi al si neforgeseblajn travivaĵojn.

Belegajn travivaĵojn en internacia esperantista medio eluzis julie dudek unu sekcianoj, partopreninte la 17-an Ekumenan E-Kongreson en hungara urbeto Piliscsaba. Kadre de ĝi ne mankis ekskursoj al urbo Esztergom kaj la ĉefurbo Budapeŝto.

Nu kaj aŭguste okazis la plej grava nunjara sekcia aranĝo – la 14-a Katolika E-Tendaro en Sebranice. Partoprenis ĝin 55 personoj, inter ili kvin gastoj el Slovakio kaj Slovenio. Krome por unu-du tagoj vizitis la tendaron multaj karaj gastoj. Sian lingvoscion oni povis pliperfektigi en E-kursoj por komencantoj, progresintoj kaj en la konversacia kurso.

Belegajn kongresajn travivaĵojn dum la pasintjara IKUE-kongreso okazinta en Litovio memorigis al ni oktobre en nia lando gastanta kantkoruso el la kongresurbo Kretinga, kiu danke al niaj sekcianoj havis ne nur garantitan bonan tranokteblecon, sed ankaŭ eblecon prezenti sian belegan koncerton en urbo Holešov.

Kompreneble, multaj sekcianoj ankaŭ aktive partoprenas aranĝojn de aliaj asociaj sekcioj kaj lokaj E-kluboj aŭ rondetoj. Tion atestas ankaŭ la fakto, ke kvar personoj el ses honorigitaj per titolo „Honora membro de ĈEA“ estas ĝuste membroj de la katolika sekcio.

Jam dek kvin jarojn aperas kvaronjara gazeto de la sekcio „Dio benu“, legata ankaŭ en multaj eksterlandoj.

Tiom nur tre koncize pri aktivadoj de la Katolika Sekcio en la nuna jaro. La venonta jaro fariĝos por la sekcio tre grava, ĉar ĝi transprenis realigi denove gravan taskon – aranĝon de la 59-a Kongreso de IKUE en Velehrad, en la tagoj de la 8-a ĝis la 15-a de ju-

lio 2005. Kun ĝojo estis akceptita propono de Ĉeĥa E-Junularo, ekligi kunlaborajn kontaktojn kun nia sekcio, precipe ankaŭ lige kun aranĝo de la venontjara IKUE-kongreso. Partopreni la kongreson povas ne nur la katolikaj esperantistoj, sed ĉiuj, kiuj simpatias kun iliaj aktivadoj. Pli detalajn informojn rilate al la kongreso kaj la Katolika Sekcio de ĈEA volonte disponigos al vi ĝia prezidanto Miloslav Šváček, Tršická ul. 6, 751 27 Penčice, retpoŝte: m.svacek @seznam.cz aŭ pertelefone: 581 228 304, akireblaj ili estas ankaŭ pere de TTT-paĝoj:
http://mujweb.cz/Spolecnost/Svacek/

## Jednání svazového výboru

Dne 12. 11. 2005 se konalo v Brně 13. jednání výboru ČES. Bylo to první jednání nového výboru zvoleného na sjezdu ve Vyškově.

Na jednání byli pozváni odstupující členové, paní Libuše Dvořáková a pan Jindřich Ondráček, předseda dozorčí rady pan Josef Hron, redaktor Starta pan Miroslav Malovec a předsedkyně ČEM slečna Dáša Chvátalová.

Nový výbor poděkoval odstupujícím členům za jejich práci, popřál zdar v jejich další činnosti a osobním životě a předal malé pozornosti.

Členové výboru si rozdělili další kompetence (viz strana 98), rozpracovali usnesení, určili postup další práce, ustanovili inventurní komisi a zabývali se záležitostmi týkajícími se esperantského odboru v Muzeu v České Třebové.

Dále se zabývali členskou základnou, hospodařením svazu a přípravou rozpočtu na rok 2006. V rámci snižování výdajů stanovili čtyři pravidelná jednání ročně a schválili hlasování prostřednictvím e-mailu.

Členové výboru zodpovědní za činnost klubů a sekcí se zkontaktují s jejich předsedy a dohodnou se na další spolupráci s výborem.

Na svazových internetových stránkách jsou vystaveny informace ze sjezdu ve Vyškově, budou vystavovány zápisy z jednání výboru a elektronická verze časopisu Starto.

Výbor byl informován o jednání E-Višegrádské čtyřky v Bratislavě a o vnějších vztazích s EEU.

*-mv-*

## Lada BALA - 85

**Ladislav Bala** el Moravské Budějovice, membro de EK Třebíč, honora membro de ĈEA, festis la 28-an de aŭgusto 2005 sian 85-jariĝon. Li apartenis al ĉefaj kunlaborantoj de Pavel Sittauer dum organizado de Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov. La historion de la tendaro li dokumentis per ekspozicio de fotoj (instalita en la tendaraj oficejo kaj manĝejo) kaj per detala statistiko pri la partoprenintoj de la kursoj en la tendaro.

## Dieter Berndt - 70

La 29-an de junio 2005 ĝisvivis 70-jariĝon nia germana lanĉovano „Čenda“, tradukinto de *Knaboj de Kastora Rivero* de J. Foglar.

# Novaj honoraj membroj

Samideano **Ing. Josef Hron** – membro de EK de Dr. Schulhof Pardubice, kie li aktive laboras kiel kasisto. Gvidas konversacian kurson. En 1996 li fariĝis membro, poste prezidanto de asocia kontrola komisiono. Li aktive laboras ankaŭ en AEH, nun kiel vicprezidanto. Nunjare li gvidis karavanon al UK Vilno, kiun aranĝis AEH. Krom tio, li jam kelkajn jarojn kompilas grandan Esperanto-vortaron en elektronika formo kaj prelegas pri tiu laboro. En lasta tempo li ankaŭ publikigas en diversaj gazetoj kaj ĵurnaloj.



Samideano **Ludvík Chytil** esperantistiĝis jam en 1953, membro de EK Přerov. Li apartenas al fondintoj de la klubo kaj multajn jarojn estis kluba prezidanto. Li senĉese estis kaj ĝis nun estas „motoro“ de la klubo. Li scias laŭdi bonan laboron, sed ankaŭ kritiki, kio al li ne plaĉas, estas egale ĉu ĉe ni aŭ eksterlande. Li partoprenis jam 12 universalajn kongresojn de UEA kaj partoprenas multajn diversajn aranĝojn enlande kaj eksterlande. Li esperantigis multajn propagandajn materialojn pri Přerov kunlaborante kun urbaj institucioj – urba magistrato, urba muzeo. En la jaro 2004 la urbestro transdonis al li urban premion – Medalon J. A. Komenský pro propagando de la urbo per Esperanto.



Samideanino **Zdenka NOVOTNÁ,** prezidantino de Esperanto rondeto „Amikeco“ en Česká Třebová. Ŝi aktive laboras ankaŭ en AEH kaj IKUE. De 1986 ŝi ofereme instruas lernantojn en bazaj lernejoj en Česká Třebová, Opatovec, Brandýs n/Orlicí. Kun „siaj“ infanoj ŝi preparas propagandajn programojn, organizas diversajn programojn – scenetojn, dancetojn, kantetojn ktp., kiujn sukcese prezentas en diversaj aranĝoj, - asociaj konferencoj, diversaj renkontiĝoj, sed ankaŭ eksterlande – Francio, Britio, Pollando, Hungario, Italio, Litovio, Latvio, Kroatio. La programoj havis ĉie grandan sukceson. Zdenka Novotná aperas ĉie, kie ŝi estas necesa por Esperanta movado.



Samideano **Jindřich ONDRÁČEK** unuafoje kontaktis Esperanton en la jaro 1953 en Plzeň, kie li vizitadis Esperanto-kurson gvidatan de la fama ĉeĥa esperantisto Rudolf Burda. En tiu jaro li ankaŭ aniĝis en la Esperanta Klubo de Plzeň. Ekde la jaro 1955 li estas senĉese ĝis hodiaŭ membro de la Esperanta Klubo en Praha. Li funkciis, ekde sia aniĝo, preskaŭ en ĉiuj komitatoj de la Klubo. Ties prezidanto li estis en la jaroj 1965 – 1966 kaj 1979 – 1984, kasisto de la Klubo li estas de 1997 ĝis hodi-



aŭ. Li aktive laboris ankaŭ sur la kultura kampo Esperanta, nome li estis membro de siatempe famekonata Verda Ĉaro de Julio Baghy. Ĉi tiu grupo ĝis nun havas gravan lokon en la historio de Esperanto-movado. En la jaro 1999 li estis elektita por la Komitato de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj tie li funkciis ĝis nun kiel kasisto. Ekde la jaro 1978 li estas dumviva membro de ĈEA (kategorio F). S-ano Ondráček povas prave fieri pri tio, ke li ekde sia unua kontakto kun Esperanto senĉese, sen ajna interrompo, aktive kaj sindone laboras por ĝi en diversaj sferoj de la movado. Li apartenas al la homoj, kiuj per sia sindona kaj persista laboro helpis kaj helpas al nia movado superi eĉ malfacilajn tempojn.

Samideanino **Bohuslava Pelclová**, esperantistiĝis jam emerita, la unuan informon pri Esperanto ŝi aŭdis en radio-elsendado. Ŝi finstudis korespondan kurson, poste ankoraŭ partoprenis diversajn kursojn kun ekzamenoj, ankaŭ en Slovakio kaj en Bulgario ŝi ricevis atestojn pri siaj scioj. Kvankam ŝi vivas en Šternberk, ŝi aktivas en EK Olomouc, instruis Esperanton en la klubo, sed ankaŭ en religia lernejo Caritas. Ofte ŝi partoprenis diversajn aranĝojn kaj kongresojn. Ĝis nun ŝi preskaŭ regule partoprenas aranĝojn en la tuta respubliko kaj ofereme akompanas handikapitan amikinon D. Vokáčová. Ŝi estas



konvinkita, ke Esperanto donis al ŝi multon – bonegan aktivecon en emerita aĝo.

Samideano **Miloslav Šváček** havas eksterordinarajn meritojn por Esperanto-movado. Li dediĉas ĉiun sian tempon kaj fortojn precipe al laboro por IKUE. Li organizis jam 20 tendarojn, 2 kongresojn en Ĉeĥio kaj kunorganizas aliajn en eksterlando, redaktas gazeton „Dio benu“. Estimon de esperantistoj pruvas elekto por funkcio de la prezidanto de IKUE. Li organizas karavanojn al kongresoj de IKUE aŭ ekumenaj. Samideano Šváček ankaŭ multe dediĉas sin al junaj esperantistoj. En la jaro 2006 denove okazos 59-a kongreso de IKUE ĉe ni en Velehrad.



## Karel FRANC - 80

**Karel FRANC** el Pardubice, honora membro de ĈEA, atingis la 6-an de aŭgusto 2005 sian 80-jariĝon.

Li estis gvida persono de Esperanto-movado en Pardubice, kie li organizis Renkontiĝojn de Pacbatalantoj en la totalisma tempo. Sed lia signifo estas tut-asocia - li estas iama sekretario de ĈEA, multjara estro de la ekzamena komisiono de ĈEA kaj estro de lektoroj ĉe skribaj kursoj.

Gravan spuron li postlasis ankaŭ kiel aktivulo en SET Lančov, por kiu li prizorgadis instruistojn.

# Ĉefdelegito de UEA

**Mi koncize informos vin pri individua membreco en UEA.**

En la jaro 2004 UEA havis 5856 individuajn membrojn, kio estis iom pli multe ol en 2003. Ĉi-jare la kresko daŭris kaj en septembro la nombro de individuaj membroj jam superis 6000 unuafoje post la jaro 2001.

Aparte rimarkindas, ke la nombro de junaj individuaj membroj kreskas pli rapide ol averaĝe. En 2004 TEJO nombris 436 individuajn membrojn sed ĉijare la nombro superos 500.

**Do kiel en Ĉeĥio?** En tiu ĉi jaro 2005 aliĝis pere de ĉefdelegito entute 73 individuaj membroj de UEA, kio ja superis kelkajn lastajn jarojn! Dankon al vi ĉiuj, kiuj ne hezitas tiamaniere subteni la internacian movadon.

**Laŭ kategorioj:** MG - 6 esperantistoj, MJ/MJ-T - 44 esperantistoj, MA - 23 esperantistoj. Krome, 3 esperantistoj aŭ kluboj uzis eblecon simple aboni la revuojn Esperanto aŭ Kontakto.

Mi alvokas vin plu daŭrigi vian individuan membrecon !!!

**Kiel membro de UEA:** *Vi apartenas al komunumo de esperantistoj en 120 landoj - vi subtenas Esperanto-movadon tra la mondo - vi estas aktuale informata (pere de Jarlibro aŭ revuoj depende de via kategorio) - Vi ĝuas malplialtan kotizon por partopreni UK-on aŭ IJK-on.*

La kotizoj por 2006 estas fiksitaj same kiel por tiu ĉi jaro:

**MG** (membro kun Gvidlibro – mi atentigas vin, ke en tiu ĉi kategorio vi ne rajtas je malplialta UK-kotizo) **200,-Kč**

MJ-T (membro kun Jarlibro, ĝis 29 jaroj membro en TEJO kun la revuo Kontakto) 490,- Kč

MA (membro kun Jarlibro kaj la revuo Esperanto) 1220,- Kč

Abono de Esperanto: 770,- Kč

Abono de Kontakto: 460,- Kč

**Pri la pago.** Plej bone pagu vian kotizon dum la monatoj decembro kaj januaro. Bonvolu akcepti, ke pli poste mi ne tiom ofte administras – momente mi ne laboras (ne estas komputilo je mia dispono ĉiutage) kaj restas kun mia eta filo ofte en montaro.

Vi povas pagi la kotizon ĉe ajna filio „Poštovní spořitelna“ aŭ ĉe preskaŭ ĉiu filio „Česká pošta“, kie vi prenu la formularon „VKLAD“. La konto estas: **195 230 825**. „Variabilní symbol“: al unuaj kvin punktoj enskribu numeron de via **ĈEA-legitimilo** (ĝi estas indikata ĉe via adreso, kiam vi ricevas Starton). Se vi ne estas membro - simple enskribu kvin nulojn: 00000 kaj atentigu min pri via pago (plej bone per interreto, aŭ telefone aŭ poŝte) kaj poste por pluaj kvin punktoj enskribu **06941**. „Konstantní symbol“ estas **0379** kaj la nomo por la konto: **Český esperantský svaz**.

**Estimataj delegitoj kaj fakdelegitoj.** Bonvolu kontroli aktualecon de via adreso ktp. en la Jarlibro 2005 kaj eventuale informu min pri ĝia ĝustigo. Mi jam ricevis kelkajn ĝustigojn eĉ sen tiu ĉi anonco – dankon (vi ne denove informu min).

Mi deziras al vi ĉion la plej bonan en via privata, profesia kaj esperantista vivo en la jaro 2006.

Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. 1, 130 00 Praha 3, tel 603 444 828, e-mail: lucie.karesova@seznam.cz

# Výsledek ankety

*V minulém čísle jsme zveřejnili anketu, na kterou jsme dostali 58 odpovědí. Zveřejňujeme nyní výsledky na ty otázky, na které bylo možno odpovědět zaškrtnutím uvedených možností. Čísla uvádějí počet odpovědí u uvedené možnosti. Některé ze zajímavých rozvedených myšlenek uvedeme příště.*

**1 Jak jste se naučil(a) esperanto?** Samouk 12 - korespondenční výuka 12 - v klubu 30 - jinak 8.

**2 Jste členem / členkou nějaké esperantské organizace?** *(doživotní / řadový)* ČES 23/30, AEH 3/20, UEA 3/18, SAT 0/5, místní klub 9/36, jiné 2/6.
Bývalé členství: ČES 3, AEH 1, UEA 2, SAT 2, místní klub 6, jiné 3.

**3 Máte / měl(a) jste nějakou funkci?** Ano 38, ne 17.

**4 Účastníte se esperantských akcí?** Klubové schůzky 47, jazykové semináře 22, konference ČES 37, zahraniční setkání 23, jiné 21.

**5 Jak hodnotíte práci výboru svého klubu?** Kladně 40, záporně 1, nezajímám se 4, jinak 7

**6 Jak hodnotíte práci sekcí ČES?** Kladně 29 - záporně 2 - nezajímám se 13 - jinak 12.

**7 Jak hodnotíte práci výboru ČES?** Kladně 36 - záporně 1 - nezajímám se 9 - jinak 10.

**8 Jak hodnotíte práci výboru dalších organizací?** AEH: Kladně 34 - nezajímám se 12; UEA: Kladně 24 - nezajímám se 12, jinak 4; SAT: Kladně 10 - nezajímám se 24.

**9 Jste dostatečně informován(a) o dění v esperantském světě?** ČES: mail 16, web 10, zpravodaj 24, časopisy 31; AEH: mail 6, web 2, zpravodaj 19, časopisy 7; Klub: mail 3, web 4, zpravodaj 14, časopisy 7.

**11 Měla vaše dosavadní činnost kladný vliv na rozšíření esperanta?** Ano 33 - ne 9 - jiný 12.

**12 Jak hodnotí vaši činnost přátelé, kolegové ze zaměstnání, sousedé ap.?** Kladně 36 - záporně 4 - jinak 21.

**13 Uspokojuje vás dosavadní stav fungování a prezentace těchto esperantských organizací? (**Ano / Ne / Neumím odpovědět) ČES 28/13/9, AEH 31/1/12, UEA 18/3/17, SAT 10/0/23, místní klub 28/12/4.

**16 Pomohla vám znalost esperanta mimo hnutí?** Ano 41, ne 14.

**17 Navštěvujete se také s jinými esperantisty mimo organizované akce?** Ano 41, ne 14.

**18 Podporujete zavedení univerzálního jazyka jako jednacího jazyka EU?** Ano 51, ne 5.

**21 Doporučil(a) jste za poslední rok někomu studium esperanta nebo přijmutí členství ve svém klubu?**
Ano 38, ne 16.

**22 Vážíme si soukromých aktivit propagujících esperanto. Měly by být ale zastřešeny svazem. Souhlasíte?**
Ano 39, ne 24.

# 25-a ĈESAT fare de E-Asocio „Saksa Svisio“

La aranĝo ĈESAT (Ĉeĥa-Saksa Tago) jam havas multjaran tradicion. Ĝi ligiĝas al kontaktoj inter geesperantistoj en norda Ĉeĥio kaj Saksio, kiuj origine komenciĝis jam dum 20-aj jaroj de la pasinta jarcento. Iniciatintoj de novaj regulaj renkontiĝoj estis post longa paŭzo antaŭ 25 jaroj gesamideanoj el Ústí n. L. kaj el Pirna. Ĉelima situo kaj proksimeco de ambaŭ urboj (42 km) prezentis la ĉefan rolon por tio.



Ĉijara aranĝo okazis la 9-an de oktobro kaj komenciĝis je la 11-a horo en la vilaĝo Dürrröhrsdorf-Dittersbach, proksime de Stolpen (sur tiea Belvedere „Schöne Höhe“ – rigardejo Bela altaĵo). Tie ni aŭdis tre interesajn informojn pri la agado de bienestro Johann Gottlieb Quandt (1787-1859), en kies familio funkciis kiel instruisto fame konata J. W. Goethe. J. G. Quandt, konata ŝatanto de arto kaj artaĵoj, ĉirkaŭigis sin per homoj de tiu fako. Ĝuinte iliajn oftajn kontaktojn, inkluzive tiujn kun Goethe, li esprimis sian dankemon per konstruo de malgranda somera sidejo sur la menciita altaĵo. Ĝi aspektas kiel malgranda kasteleto kaj servis kiel somera renkontiĝejo por multflankaj diskutoj de Quandt kaj liaj geamikoj. La konstruaĵo estas bone prizorgata kaj oni uzas ĝin nun kiel koncertejon, geedziĝejon kaj klerigejon. Salono estas belege ornamita, suprajn partojn de muroj ornamas plejparte citaĵoj de Goethe-poezio.



Post la tagmanĝo ni reveturis al Pirna-Copitz, kie okazis ekde la 14.00 h en restoracio “Gartenfreude” (Ĝardena ĝojo”) prelego pri psikiatria hospitalo ”Sonnenstein” (samnoma kastelo kaj ankaŭ la urbokvartalo de Pirna) - prelegis prof. d-ro Hans Eichhorn (origina Pirna-ano, nun li estas vivanta proksime de Postdam), kiu preferas kuracmetodojn por mense malsanaj pacientoj sen medikamentoj.

Dum paŭzoj inter unuopaj programeroj kaj post la prelego de d-ro Eichhorn havis ĉiuj 27 partoprenantoj el Saksio, Turingio kaj Ĉeĥio (P. Jačka-Kroměříž, J. Kříž-Ústí n. L. kaj M. Smyčka-Č. Budějovice) sufiĉe da tempo por babili kaj praktiki la lingvon. Disadiaŭo estis kortuŝa, kiel ĉiam.

*Josef Kříž*

## 100-jara jubileo de Germana Esperanto-Asocio

83-a GEA-Kongreso Braunschweig
Brunsviko 02-05.06.2006

La 19-an de majo 1906 estis fondita en Brunsviko la Germanlingva Esperantista Societo kun membroj el Germanio, Aŭstrio kaj Svislando. Prelegos: D-ro sc. Detlev Blanke, D-ro Werner Bormann, D-ro Ulrich Lins, Prof. Erich-Dieter Krause. Aliĝilojn bv. peti de la GEA-komisiito pri aranĝoj: Christian Darbellay, Kaiserstr. 39 DE - 24143 Kiel, Tel. 0431/ 73 77 88, Esperanto-Kiel@web.de

## La 18-a Aroma Jalto lingva Esperanto-festivalo

29.04-09.05.2006 Krimeo, Jalto. Seminarioj por Esperanto-instruantoj; lingvaj diversgradaj kursoj; Universitato; ekskursoj, piedmarŝoj; koncertoj; ludoj. Bona parolkapablo necesa. La aliĝon bonvolu sendi al Volodimir Hordijenko ĝis la 1-a de marto 2006 UA-01133, Kijiv-133, p.k. 35; tel. **(044) 285 17 01** Reta adreso: **volodimir_h@yahoo.com www.aromajalta.by.ru**

## Esperanto en Afganujo

Juna kuracisto Saidnabi Saidilhomzoda, vicprezidanto de la Taĝika Esperanto-Asocio, instruas en Kabulo E-on en 4 posttagmezaj kursoj (komence kun 150 lernantoj) malgraŭ la senĉese eksplodantaj bomboj. Tiel nia lingvo disvastiĝas inter perslingvanoj.

## Enlanda informado

* La 31-an de oktobro 2005 alportis *Zpravodaj z Okříšek* (Informilo de Okříšky) informon pri desegnokonkurso por infanoj omaĝe al H. Ch. Andersen en la franca Vendomois - la duan premion en kategorio B akiris **Anna Nováková** (5-a klaso) el Esperanto-rondeto de Okříšky kaj pluraj dek partoprenantoj ricevis honoran mencion. La lernejestro D-ro Jaromír Velc kaj instruistino d-ino Kamila Bártlová solene transdonis al ŝi la diplomon kun du esperantigitaj ĉinaj fabeloj kaj ĉeĥlingva fabelaro de Andersen.

* La 10-an de novembro 2005 en la Urba Biblioteko de Mladá Boleslav estis solene baptita nova **Legolibreto II**. redaktita de Jindřiška Drahotová kaj Miroslav Vaněk (kiu tralegis kelkajn fragmentojn kune kun Milada Kolářová kaj Vladimír Kolář) .

* **Esperanto není obtížný jazyk** (Esperanto ne estas malfacila lingvo) en *Rovnost* 22.10.2005 kaj **Esperanto je lehké** (Esperanto estas facila) en *Vyškovské noviny* 27.10.2005 estas du similaj artikoloj, kiujn redaktorino Petra Cidlinská verkis pri Vratislav Hirš okaze de nia asocia kongreso en Vyškov.

Upozorňujeme členy, že termín k zaplacení členského příspěvku je konec roku. Klubům a kroužkům, které poukáží členské příspěvky do 31. 12. 2005 na účet svazu připíšeme na jejich podúčet vedený svazem částku 10% ze zaplacených příspěvků.

Nezapomeňte si včas předplatit členství v UEA a odběr nabízených časopisů.

# La stato de la Faka Libraro de ĈEA

La pasinta kongreso de ĈEA taskis al la Komitato refunkciigi la iaman Libraron de Scienca-Teĥnika Sekcio de ĈEA. Ĉi tiu libraro, ekde sia estiĝo, troviĝis en pluraj lokoj en Ĉeĥio kaj zorgis pri ĝi sinsekve 3 respondeculoj – s-anino Marie Bartovská, s-ano Jan Werner kaj s-ano Jan Pospíšil. Ĉiu el la respondeculoj uzis „sian“ sistemon de la katalogado, kaj se oni konsideros plurfojan transportadon de la libraro, ne estas mirinda la fakto, ke la ordo de la libraro en la tempo de ties transpreno de la lasta respondeculo estis iom ĥaosa.

**En la jaro 2002** fakte estis en la transprenata libraro sume **60 vortaroj, 255 fakaj libroj, 9 prospektoj, 100 revuoj kaj 94 beletraj libroj – do entute 518 publikaĵoj** Esperantaj aŭ pri Esperanto. Ĉe la malnovaj libroj oni ne ŝanĝis la ĝisnunan iom komplikan sistemon de katalogaj numeroj/signoj, tamen la novajn publikaĵojn oni katalogas laŭ la nova maniero, nome en 5 grupoj:

**1.** Vortaroj kaj terminaroj;
**2.** Lernolibroj kaj gramatikoj de Esperanto (eventuale de aliaj planlingvoj);
**3.** Fakaj libroj kaj prospektoj en Esperanto el ĉiuj sciencaj branĉoj;
**4.** Revuoj kaj ĵurnaloj Esperantaj, kaj fakaj kaj nefakaj;
**5.** Beletro.

Ekde la jaro 2002 ĝis 2005 la **Faka Libraro de ĈEA plu kreskis, nome je 26 vortaroj kaj terminaroj, 25 lernolibroj de Esperanto, 41 fakaj libroj, 1 kolekto de revuo** kaj **20 libroj beletraj – t. e. sume 113 publikaĵoj.** Oni nun difinas ankaŭ, kiu libro estas tiom valora, ke oni ĝin ne rajtas prunti ekster la Libraro.

Kiam en la jaro 2002, iom post iom, transprenadis s-ano Zdeněk Pluhař, kiel nova respondeculo, la Fakan Libraron, ĝi estis lokita en la ejojn de Libroservo de ĈEA, ĉar s-ano Pluhař zorgis samtempe ankaŭ pri la Libroservo. La refunkciigon de la Faka Libraro ĝenis la fakto, ke ĝi devis, same kiel Libroservo, ŝanĝi dum la 3 lastaj jaroj sian lokon, el Praha-Běchovice al Dobřichovice, kaj ĉi-jare fine al Poděbrady. Tamen **dum la jaro 2004 estis la Libraro refunkciigita.** Ĉiuj novaj **alkreskaĵoj estis katalogitaj**, ellaborita **la regularo por la libro-pruntado** kaj komenciĝis **pruntado de libroj pere de poŝto**. Bedaŭrinde la energio elspezita por la refunkciigo de la Libraro ne havas adekvatan eĥon en la intereso de la membroj de ĈEA – **averaĝe du pruntoj dum jaro** estas malĝoja fakto.

Aldone mi menciu, ke dum la lasta translokigo de la Libraro al Poděbrady (en junio 2005), kie pri ĝi zorgas la sekretario de ĈEA s-ano Pavel Polnický, estis likviditaj fakaj libroj ĉeĥaj kaj germanaj, kiuj tute ne tuŝis Esperanton kaj krome estis tro malnoviĝintaj (ili devenis plejparte el la 40-aj kaj 50-aj jaroj de la pasinta jarcento).

Nun ni nur esperu, ke estonte pliintensiĝos la intereso de niaj membroj pri la faka literaturo deponita en nia Faka Libraro.

08.10.2005 zp

# Nia "Esperanto-muzeo" rimarkoj kaj imagoj

Kiam metis samideano J. Pištora la proponon fondi Esperanto-muzeon ĉe Urba Muzeo en Česká Třebová, la komitato de ĈEA estis entuziasmigita. La kondiĉoj por tiu ago tiutempe ŝajnis optimumaj. La movado estis sufiĉe vigla, la asocia komitato laborema, direktoro de la muzeo estis esperantisto, en Č. Třebová bone funkciis Esperanto-klubo. Favora estis ankaŭ fakto, ke la urbo estas grava fervoja nodo de nia respubliko, do facile atingebla de estontaj vizitantoj. La iniciato de J. Pištora estis unuanime akceptita, la aferon pozitive pritraktis ankaŭ la urba deputitaro kaj sekve estis subskribita kontrakto inter ĈEA kaj la urbo pri establo kaj plua prizorgo de Esperanto-fako en la muzeo.

Laŭ nuntempa vidpunkto la kontrakto ne estis jure sen mankoj, sed tiam ni ĉiuj - kio ja inter esperantistoj ofte okazas - estis plenaj de entuziasmo kaj espero kaj detalojn ni malatentis. La Esperanto-fako de la muzeo komence ĝuis subtenon de esperantistoj, venadis kelkaj por ordigi materialon, kiu komencis amasiĝi en la muzea deponejo precipe kiam la asocio mem kaj ankaŭ iuj Esperanto-kluboj ekhavis problemojn pri siaj kunvenejoj ktp. Venis ankaŭ kelkaj postlasaĵoj - de J. Karen, J. Rumler, J. Mařík, tiu estis eksterordinare ampleksa - kaj pluaj. Iom post iom la subteno de esperantistoj malfortiĝis, poste tute ŝrumpis preskaŭ al nulo. Mi vizitadas la deponejon laŭeble ofte, tamen en lastaj jaroj mi apenaŭ trovas tie esperantiston. Sed ja ankaŭ estas vero, ke oni ne povas deponejon de muzeo libere vizitadi - tio ja validas ĝenerale - kaj krome, esperantisto-volontulo devas bone orientiĝi en la movado kaj ĝia historio por respondeme klasifiki valoron de amasigita materialo - ne ĉiu papero estas dokumento grava por historio.

La komenca evoluo aspektis esperige kaj oni ne tro cerbumis, kion alportos fakto, ke samideano J. Pištora foje pro aĝo eksiĝos el la posteno kaj la muzeon estros nova persono. Tiu momento venis en la jaro 2003, de tiu jaro direktas la muzeon nova persono, Mgr. Voleská. Ŝi - diference de J. Pištora - estas kvalifikita fakulo - ŝi studis historion kaj muzeosciencon en la Silezia Universitato en Opava. Sed ŝi ne estas esperantistino. La ŝanĝo de la gvidpersono baldaŭ alportis problemojn, kiujn oni nun strebas solvi. Al ĉeĥaj esperantistoj venis informoj pri minaco direkte al la "Esperanto-muzeo" kaj ĝia eventu-

ala malfondo. Eĉ mi skribis longan malkontentigan leteron al la urbestraro kaj akre mi kritikis ricevitajn informojn, kelkfoje mi diskutis ankaŭ kun la nova direktorino. Simile la komitato de ĈEA komencis agi - laŭ mia opinio ĝi iom fordormis kaj vekiĝis preskaŭ "post la dekdua horo". Tamen - en kia stato nun fakte estas la muzeo kaj kiajn intencojn havas ĝia prizorganto - tion mi emus iom priskribi. Por ĝuste kompreni tiujn problemojn, estas necese mencii kelkajn ĝeneralajn aferojn.

Kolektoj, kiuj estas en muzeoj kaj galerioj - kompreneble escepte de tiuj, kiuj estas privataj - estas protektataj de la ŝtato, kion deklaras la leĝo 122/2000 Sb. (tio signifas "Kolekto de leĝoj"). Ĝi preskribas, kiel oni devas registri, prizorgi kaj ŝirmi kolektojn kaj iliajn unuopajn objektojn. Mi aldonu, ke tiaj kolektoj estas registritaj de ministerio de kulturo, sen kies konsulto oni ne rajtas kun kolektoj manipuli - do vendi, dediĉi, nuligi ktp. Sammaniere oni traktas ankaŭ kun kolekto privata, se ĝia posedanto envicigos ĝin sub ŝtata protekto.

Eble simila principo estas ankaŭ en aliaj ŝtatoj, tial ekz. la origine privata Fajszi-kolekto en Budapeŝto estas envicigita en Landan Fremdlingvan Bibliotekon kaj nun ĝin protektas la Hungara ŝtato. La supre menciita leĝo difinas, ke kolektaĵoj konsistas el objektoj moveblaj kaj nemoveblaj. Alian econ de kolektataj objektoj ĝi ne mencias, tamen oni komprenas, ke ĉiu objekto estas spaca, do tridimensia. Tio rezultas el preskriboj, kiel oni devas la kolektojn listigi. Laŭ la leĝo oni devas ĉiun eron de kolektaĵo listigi memstare, oni devas priskribi ĝin, konstati ĝian materialon, mezuri ĝiajn dimensiojn, pesi ĝin, noti ĝian aŭtoron - se ekzistas, daton de ekesto, daton kaj manieron de ĝia eniro en kolekton, ktp.

Plua punkto de la menciita leĝo diras, ke oni devas aparte marki arkivajn dokumentojn, se tiuj estas parto de la kolekto. En realo tio signifas, ke ĉiu "papero" devas havi propran numeron kaj registran karton. Kaj mi efektive dum miaj kelkaj vizitoj en deponejo en Č. Třebová vidis, ke laborantoj de la muzeo kelkajn semajnojn pesis, mezuris kaj signis ĉiun el pli ol kvin mil libroj, kiuj nun estas en la Esperanto-biblioteko, kiu jam estas registrita kiel oficiala kolekto.

Ĵus cititajn postulojn apenaŭ plenumas dokumentoj, kiuj rezultiĝas el agado de esperantistoj kaj nun amasiĝas en la muzea deponejo. Krom nur kelkaj aspekte muzeaj objektoj - la libroj, kiujn mi

jam menciis, plue insignoj, medaloj, bustoj de Zamenhof, kompletaj albumoj - la plej granda parto de kolekto estas paperaj dokumentoj. Sed por tiuj validas alia leĝo - n-ro 499/2000 Sb. "pri arkivado kaj skriboagendo." Al tiuj, kiuj laŭ tiu leĝo havas devon prizorgi dokumentadon, apartenas ankaŭ civitanaj organizaĵoj - do la leĝo devontigas al tio ankaŭ nian asocion. Tiu "arkiva" leĝo rigore difinas, kiajn dokumentojn oni devas konservi kaj kiu estas rajtigita inspekti tion. Grava diferenco de ambaŭ ĉi tie jam menciitaj leĝoj estas ankaŭ tio, ke por la "muzea" leĝo (122/2000) estas la supera institucio la ministerio de kulturo, dum por la leĝo "arkiva" (499/2004) la ministerio de internaj aferoj. "Arkiva" leĝo ne postulas registron de ĉiu unuopa ero, la dokumentoj havantaj ian komunan econ - ekzemple aŭtoron, fakon, posedinton ktp. - formas "fondaĵon", kiu restas kiel tutaĵo kun eventuala nombro de folioj. El tio sekvas, ke dokumentaro pri Esperanto-agado en nia lando povas formi kelkajn fondaĵojn, ekzemple de centra oficejo, de faka agado, de unuopaj kluboj aŭ unuopaj gravaj esperantistoj. Tamen tion oni rajtas fari nur en arkivejo, sed ne en muzeo.

La arkiva leĝo ankaŭ difinas, ke ĉiu "produktanto" de arkivaĵoj devas krei "arkivan regularon", laŭ kiu devas la institucio mem klasifiki siajn proprajn dokumentojn kaj konservendajn materialojn ĝi poste transdonas al koncerna arkivejo, tio signifas al distrikta, regiona aŭ centrala arkivo. La arkiva regularo devas esti aprobita de ŝtata arkivejo. Diferencon inter muzeo kaj arkivejo klare ilustras ankaŭ kutima informo pri grandeco de kolektita materialo. Muzeoj ĉiam anoncas, kiom da objektoj ili havas, dum arkivoj publikigas, kiom da metroj da arkivaĵoj ili havas. Do estas sufiĉe klare, kiel diferencajn kondiĉojn de prizorgado postulas objektoj muzeaj kaj arkivaj. Oni do ne povas miri, ke nova estrino de la muzeo ne tro emas trakti esperantaĵojn kiel muzeaĵojn,  dum ili havas karakteron de arkivaĵoj. Des pli, kiam en la muzeo neniu regas Esperanton - do, kiel oni ekkonu, pri kio temas kaj ĉu la dokumento estas por historio grava? Alia plendo de la estrino rilatas al kompletigado de la kolekto: Kiam la muzeon gvidis aktiva kaj konata esperantisto, li ricevadis sufiĉan stokon da diversaj esperantaĵoj, kiujn li envicigis al kolekto. Sed nun la movado nur sporade provizas la muzeon per novaj aperintaĵoj kaj oni ne atendu, ke la muzeo havos sufiĉe da financoj por aboni aŭ aĉeti novajn, ofte sufiĉe kostajn esperantaĵojn. Ĉi

tie oni devus fidi esperantistojn, sed tio ne estas por oficiala institucio akceptebla. Kaj sen regula kompletigado baldaŭ ĉiu kolekto fariĝas torseca, pri tio neniu muzeo estus kontenta.

**Kiel mi vidas pluajn solvojn de diskutitaj problemoj?**

Ĉar mi estas daŭra optimisto, mi ne falas en malesperon. Mian optimismon firmigas fakto, ke la biblioteko kun preskaŭ ses mil katalogitaj libroj jam enskribiĝis inter oficialajn kolektaĵojn laŭ supre citita leĝo. La bibliotekon prizorgas plua, fake aprobita laborantino de la muzeo, Mgr. J. Peková, kiu ankaŭ ricevis klerigon en la Silezia Univerzitato en Opava. Ŝi scias kelkajn lingvojn, do principe ŝi kapablas pri la kolekto-biblioteko ĝuste informi. Baldaŭ ŝia laborkampo plivastiĝos pri Esperantaj gazetoj, kiujn mi ordigas. En nuna tempo estas registritaj jam pli ol 250 diversaj gazeto-titoloj, kiuj prezentas kelkajn milojn da jarkolektoj kaj kelkajn dekmilojn da unuopaj numeroj - ĉiu el ili estas listigita. Nur poste komenciĝos plua laboro - klasifiki kaj decidi pri ĉiu dokumento. Mi komprenas, ke tiu laboro la historiistojn en la muzeo ne entuziasmigas, cetere tio ja ne estas ilia tasko, ĉar mi jam klarigis, ke ĉiun dokumentaron klasifiku ĝia "naskanto" laŭ aprobita arkiva regularo. Tion nek la asocio, nek kluboj, kies dokumentaron la muzeo transprenis, faris. Ĝenerale, laŭ mia scio, iu arkiva regularo en nia asocio ne estas. Do, antaŭ laborantoj de la muzeo staras malfacila laboro, komplika ankaŭ pro fakto, ke la plej multaj materialoj estas en lingvo, kiun ili ne parolas. Amplekson de estonta laboro mi povas ilustri per jena ekzemplo: Kiam la muzeo ricevis heredaĵon de J. Mařík, entute naŭ grandajn "bananajn" skatolojn, mi preskaŭ tutan jaron enmanigis unu paperon post la alia, ĉiun mi devas almenaŭ flugokule tralegi kaj specifi ĝian valoron. La kaŭzo estis, ke s-ano Mařík interesiĝis ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri historio de sia naskiĝregiono Benešov, pri Sudetoj kaj ĉeĥaj-germanaj rilatoj, pri historiaj eventoj en la jaroj 1945, 1948, 1968, sed ankaŭ pri fakaj problemoj de rubaĵoj kaj pri patento-problemoj, ĉar tio estis liaj profesiaj laborkampoj. La heredaĵo ne estis diferencigita, tial oni devis serĉi en ĉiu "papero", ĉu ĝi rilatas al Esperanto kaj ĝia movado, en kiu s-ano Mařík longajn jarojn plenumis gravajn postenojn. Post longa kontrolado restis fine nur duono de la origina materialo, kaj nur tiu resto prezentas por nia historio gravajn dokumentojn. Tamen, eĉ tiu laboro ankoraŭ ne finiĝis, ĉar oni ja devas

denove trastudi restintajn dokumentojn, ĉar Mařík en la movado aktivis en pluraj fakoj.

Vidante kvanton da deponata materialo en la muzeo, mi komprenas, ke ĝia elektado forprenus laborkapaciton de la muzeaj laborantoj por vico da jaroj. La homo, kiu tiun taskon volus plenumi, devus ankaŭ esti bona esperantisto, kiu kapablas orientiĝi en la movado kaj ĝia historio kaj iomete komprenas ankaŭ al laboro en arkivejo. Kaj ni diru sincere - kun kiom da tiaj nia movado disponas?

Kompreneble, la plej bona solvo estus privata asocia muzeo, kiu povus ordigi la muzeaĵojn laŭ propraj reguloj kaj bezonoj. Sed nia movado - des pli la asocio mem - estas tro malforta por finance teni kaj funkciigi similan instituton. Ne estas do alia ebleco ol fidi oficialan nemovadan instituton, kiu la taskon de Esperanto-muzeo plenumos - sed tiukaze ni, movadanoj, devas respekti leĝojn kaj regulojn, kiuj por tia laboro validas. Ni povas, pli precize, devas tian instituton subteni, ni povas helpi, konsili kaj demandi ties laborantojn, sed ni ne rajtas protesti kaj ordoni. Mi firme kredas, ke la gvidantaro de la muzeo en Č. Třebová konservos sian bonan rilaton al ĝis nun jam farita laboro en la Esperanto-fako kaj ke inter ĝi kaj komitato de ĈEA restos daŭra akordo. Tamen mi kapablas eĉ imagi, ke en la kazo de malintereso en Č. Třebová la muzean fakon kiel tuton povus transpreni alia publika muzeo el loko kun pli riĉa movada historio kaj kun sufiĉa deponeja kaj eskpozicia spaco, ekzemple Olomouc, Prostějov kaj aliaj. Sed povus tiun taskon transpreni ankaŭ ekzemple Přerov, kie funkcias Muzeo de Komenio -- do, muzeo nomita laŭ "patro de ideo de Internacia Lingvo", finfine en ĝi eĉ nun jam estas ia-tia Esperanta materialo, ekzemple en postlasaĵo de J. Krumpholc, kiu apartenis al eminentaj personoj en Moravio kaj ne nur pro agado en nia movado. Mi fakte nur eliminus muzeajn instituciojn en niaj urbegoj, kiel Prago, Brno ktp., kie intereso pri tiel "marĝena" afero kiel Esperanto probable estus tiesflanke tute bagatela.

Sed mi povus eĉ imagi, ke en Č. Třebová restus nur "muzeeca" materialo kaj arkivaĵojn transprenus destinita arkivejo, do oficiala ŝtata institucio, kiu garantiu, ke ĉiu dokumento estus bone prizorgata kaj konzervata. Ĉar en nia kazo temas pri la movado tutŝtata, certe tio devus estis Centra Ŝtata Arkivo.

Tamen oni devus tiun dokumentan amason klasifiki kaj traelekti antaŭ ĝia translokigo al eventuala koncerna akceptonto. *V. Kočvara*

*(mallongigita de la redaktoro)*

# Sonĝoj

Karakterizas min tri handikapoj: mi malbone vidas, mi malbone aŭdas, mi malbone paŝas.

Sed dum la nokta dormado estadas ĉio alie. Mi estas kapabla fari mian plej ŝatatan okupon – la legadon. Anticipe mi diras, ke averaĝa nombro de mi tralegitaj libroj **estis** 150 jare. En la sonĝo (ĉu tio estas sonĝo instigita per profunda DEZIRO?) mi senbare tralegas dikan libron. Mia koro estas plenigita de ĝojo, ke neniu obstaklo estas plu en ĉi-afero; nur oni devos tion resperti, kiam mi vekiĝos... Post la vekiĝo – kia embaraso!

Dum la muzik-festivalo „Praga Printempo“ mi sidas en la koncerta salonego kaj ĝuas la muzikon – same kiel dum mia tuta vivo mi faradis. Denove – granda ĝojo, ke estas forigita mia nekapablo aŭdi. Kiel facile mi tion reĝuos post mia vekiĝo! Sed post la vekiĝo – kia seniluziiĝo!

Ankaŭ okazadas, ke irante preter sportstadiono, mi estas pelata de la emo viciĝi inter la konkurantojn kaj kuri, kuri. Mi faras tion – ne daŭras longe – mi kuras fronte, lasante ĉiujn post mia dorso, mi atingas la celrubandon – kaj jen, oni gratulas al mi kaj la tuta stadiono furiozas pro mia sukceso... Kia feliĉo esti mov-kapabla, eĉ tiel eminente! Morgaŭ mi devos trakti kun mia kuracisto, kiu preskribas al mi diversajn pilolojn kontraŭ ostopatio, kial mi devas uzadi bastonojn por subteni miajn operaciitajn artikojn. Vana obstaklo en mia vivo, se mi tiel bone sportas. Tuj morgaŭ mi pritraktos! Sed morgaŭ – kia turmentiĝo!

Okazis ankaŭ: mi staras sur podio, preta alparoli grandan nombron da ĉeestantoj... UK komenciĝas. Mi flue parolas Esperanton, mi esprimas miajn pensojn kaj sentojn tiel arde, ke la salonego sonas per aplaŭdo. Ho – kia malpeziĝo, ke mi tiel senerare parolas Esperante kaj ne bezonas morgaŭ iri kun timo al la Esperanto-kurso por progresintoj**,** ke mi ne devas embarase rigardi en la okulojn de nia instruisto samideano Werner. Kia ĝuo tiel flue paroli nian ŝatatan lingvon. Venas morgaŭa mateno. Mi petas mian amikinon: „Margit, ĉu vi povas traduki jenan rakonteton, por ke nia legantaro de STARTO komprenu miajn sentojn, miajn travivaĵojn, kiujn mi povas tiel ĝui nur en **Skokovy**“?

*En Skokovy, la 13-an de novembro 2005*

*Čestmír Vidman*

P.S. Mi klopodos, ke venonte estu realigita almenaŭ ĉi tiu lasta sonĝo!

# Novaj vortoj

*Na přání čtenářů zveřejňujeme výrazy, které se týkají počítačů, internetu a mobilních telefonů.*

**počítač** komputilo; **uživatel** uzanto; **klávesa** klavo; **klávesnice** klavaro; **enter** eniga klavo; **kurzor** kursoro, tajpmontrilo; **zapsat do počítače** enkomputiligi, klavi, tajpi; **soubor** dosiero, fajlo; **adresář, složka** *(souborů)* dosierujo; **podadresář, podsložka** subdosierujo; **pevný disk** durdisko; **disketa** diskedo; **cédéčko (CD)** kompakta disko (KD), lumdisko, laserdisko, kodoromo; **DVD** lumdiskego; **vypálit** bruligi, registri; **vypalovačka** laserdiska registrilo; **mechanika CD** laserdiska legilo; **disketová mechanika** diskeda legilo; **program** programo; **Windows** Vindozo; **Word** Virdo; **font, písmo** *(soubor písmen)* tiparo; **formátovat** strukturi, aspektigi; **přeformátovat** restrukturi, reaspektigi; **přepsat** anstataŭigi; **kliknout myší na** (mus)klaki al, alklaki (per muso); **koš** rubujo, paperkorbo; **obnovit** refreŝigi; **updatovat** ĝisdatigi; **storno, zrušit, cancel** nuligu, rezignu; **virus** viruso; **antivirus** senvirusigilo, kontraŭvirusilo; **zazipovat** zipi, kompaktigi, densigi, kunpremi; **rozzipovat** malzipi, malkompaktigi, maldensigi, malkunpremi; **periferní zařízení** periferiaĵo; **skenovat** skani; **skener** skanilo; **tisknout** printi; **tiskárna** printilo; **monitor** monitoro, ekrano.

**internet** interreto; **poskytovatel připojení, provider (ISP)** Interret-peranto; **server** servilo; **WWW** *(world wide web = celosvětová pavučina)* TTT (tuttera teksaĵo); **www stránka** TTT-paĝo, retpaĝo; **www stránky, website** TTT-paĝaro, retpaĝaro; **doména** domajno; **hlavní stránka** ĉefpaĝo, frontpaĝo, hejmpaĝo; **prohlížeč** foliumilo, krozilo, TTT-legilo, retumilo; **vyhledávač** serĉilo; **odkaz** ligilo; **hyperlink** hiperligilo; **nahrát** *(program)* alŝuti; **stáhnout, downloadovat** *(program)* elŝuti; **menu** menuo; **přihlašovací jméno, uživatelské jméno** uzant(o)nomo, salutnomo; **heslo** pasvorto; **e-mail** *(elektronická pošta)* retpoŝto, elektronika poŝto; **e-mailová adresa** ret(poŝt)adreso; **e-mail** *(elektronický dopis)* ret(poŝt)mesaĝo; **zavináč @** ĉe, heliko, envolvita a; **e-mailová schránka** leterkesto, retpoŝtkesto; **spam** spamo, trudreklamo; **příloha** aldonaĵo, almetaĵo, alkroĉaĵo, kunsendaĵo; **připojeno** konektite; **nepřipojeno** nekonektite; **odpojeno** malkonektite.

**mobil** poŝtelefono; **telefonní číslo** telefonnumero; **hovor** voko; **odchozí hovor** elvoko**; příchozí hovor** envoko**; zavolat** alvoki; **nabít** ŝarĝi; **nabíječka** ŝarĝilo; **baterie** akumulatoro; **kapacita** kapacito; **výdrž** elteno; **pohotovostní doba** pretectempo; **doba hovoru** paroltempo; **roaming** *(telefonování v zahraničí)* vojaĝumo; **displej** ekrano**; anténa** anteno; **SIM karta** SIM-karto; **operátor** operatoro, telefonkompanio; **textová zpráva (SMS)** tekstmesaĝo, somoso; **poslat SMS** sendi somoson, sendi tekstmesaĝon; **multimediální zpráva (MMS)** bildmesaĝo; **WAP** *(wireless application protocol; mobilní internet)* SKAP (senkabla aplikaĵprotokolo); **GPS** *(global positioning system; navigační systém)* globala loktrova sistemo; **kalkulačka** kalkulilo; **budík** alarmo. *-mm, blahma-*

## Esperanto-Muzeo

*IEMW kaj Kolekto por planlingvoj, kiu estas integra parto de Aŭstria Nacia Biblioteko, en tiuj ĉi tagoj translokiĝas: ĝi ricevos pli taŭgan kaj pli facile alireblan lokon. Ne plu vi trovos ĝin en Michaelerkuppel.*

*Ĝi estos baldaŭ vizitebla ĉe la nova adreso:* Kolekto por planlingvoj kaj Esperanto-muzeo, Palais Mollard, Herengasse 9, AT-1010 Vieno.

*Tamen viajn poŝtajn sendaĵojn direktu al la centra poŝta adreso de Aŭstria Nacia Biblioteko:* "Kolekto por plan-lingvoj kaj Esperanto-muzeo, Josefs-platz 1, AT-1015 Wien, Aŭstrio."

Bonvolu viziti ĝian retpaĝon, kie vi estas bonvena precipe uzi la libro-katalogon Trovanto: http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm

*RET-INFO*

## Esperanto en Polička

La 5-an de novembro de 2005 sam-ideaninoj Marie Minářová kaj Libuše Dvořáková partoprenis renkontiĝon en Polička. Ĉi-tien alveturis 25 gesam-ideanoj el Praha, Žamberk, Lanškroun, Česká Třebová, Svitavy, Litomyšl, Polička kaj Sebranice. En programo estis ekskurso al la entrepreno Řebíček – premejo de plastoj. Kvankam la eks-kurso estis antaŭe interkonsentita, neniu el tiu entrepreno alvenis. Tial ni vizitis tombejon, kie estas entombigita fama komponisto Bohuslav Martinů. Ni tra-rigardis la urban placon kaj restojn de urbaj muregoj. Postagmeze en restoracio Jordán rakontis Miroslav Havran el la urbo Litomyšl ne nur pri siaj sportaj travivaĵoj, sed ankaŭ pri la vivo en la landoj, kiujn li vizitis, ekzemple Nova Zelando, Japanio, Kanado, Usono kaj aliaj. Miroslav Havran apartenas inter niaj konataj maratonveteranoj. Li partoprenis ankaŭ mondfaman 100-an jubilean maratonon en Bostono. Lia hobio estas fotografi. Ni vidis belegajn naturajn sceneriojn.



## Skribu leteron al Avo Frosto!

Pasintjare Avo Frosto ricevis preskaŭ unu milionon da leteroj kaj respondis en 37 lingvoj, inkluzive la brajlan kaj Espe-ranton. Kompreneble Avo Frosto ankaŭ ĉi-jare ne forgesis Esperanton kaj res-pondos tiel al la Esperantlingvaj leteroj.

Estas utile, se sur la koverto en bone videbla maniero vi indikas, ke temas pri Esperanto. Estas ja plurdek volontuloj ĉe la Nordpolusa Poŝtoficejo, kaj foje ili ne scias, en kiu lingvo oni skribis la leteron. Vian leteron sendu al:

**Avo Frosto, Norda Poluso, Kanado HOH OHO CANADA, inf: Normand Fleury, esperanto@sympatico.ca**

# Esperanto en Burundio

Sinjorino Teraza Kapista instruas Esperanton al 70 etaj kursanoj malgraŭ tre malfavoraj kondiĉoj (manko de lerno-materialo, manko de akvo, manko de telefonoj kaj komputiloj, tro multe da infanoj en unu klaso ktp.).



# Esperanto en Senegalio

Mi estas s-ano Alphonse Diatta, prezidanto de Senegala Esperanta Asocio (S.E.A.) kaj mi serĉas kontaktojn kun Esperanto-asocioj en Orienta Eŭropo. Mi partoprenis mian unuan Universalan Kongreson en Varsovio en 1987, estis en Budapesto kaj en Zagrebo. Mi ĝojatendos bonajn amikecajn rilatojn kun Esperanto-asocioj. Adreso: *S-ro Alphonse Diatta, B.P. 21231 Dakar-Ponty, SN-Dakar, Senegalio/Sénégal.*

# Esperanto en Togolando

De la 25-a de julio ĝis la 26-a de aŭgusto 239 infanoj kaj junuloj lernis en Instituto Zamenhof (Togolando) kadre de la feriaj kursoj. Estis disponigitaj lecionoj pri la franca, angla, matematiko kaj fizikaj sciencoj. Sep instruistoj gvidis la kurson sub la kontrolo de ATTIOGBE- AGBEMADON B. Mensah, GBEGLO Koffi kaj SAGBADJELOU Kokou.




*Foto: Libera Folio*

De la 22-a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro 2005 okazis kursoj por komencantoj, kiujn instruis s-ro KOUEVI Togbe Basile laŭ METODO 11 kaj Zagreba Metodo.

*Gbeglo Koffi*

# SMS al Afriko

Tintis mia mobilo. Mi legis, ke estas mesaĝo. Mi devis malkovri la enhavon. Jen do franca teksto aperis. Mi rekonis la skribinton. Li estas Benina Esperantisto. Mi tuj respondis ne en la franca, sed en Esperanto. Plia mesaĝo lia venis tagojn poste, nun en Esperanto. Li forgesis akuzativon kaj aliloke misuzis ĝin. Mi respondis korektante la teksteton. En aliaj tagoj devis atingi min "somosoj" interne de Togolando, kaj ankaŭ de ties ekstero. Pliafoje mi forigis skoriojn. Naskiĝis do en mi ideo pri uzo de tiu ĉi ilo por disvastigi Esperanton.

Necesas, ke esperantistoj tra la mondo sendu somosojn al afrikanoj, kolektado de telefonnumeroj ĵus komenciĝis.

*Gbeglo Koffi*

# KALENDARO 2006

**18-23. 4. 2006 Semajna Lingva Seminario en Skokovy**. Pliaj informoj www.mlboleslav.cz/esperanto aŭ drahotovaesperanto@seznam.cz

**1.-7. 6. 2006 Ekoturisma Seminario (EKOTUR 2006) en la urbeto Dobřichovice** apud Prago kaj ties ĉirkaŭaĵo. La seminario invitas ekoturistojn - kaj biciklistojn kaj piedirantojn. Ili iom konatiĝos kun la montetaro ĉirkaŭ Dobřichovice, kun Bohemia Karsto kaj dum unu tago ili vizitos ankaŭ Pragon. Nova estos la eblo boati dum unu tago laŭ la fluo de la rivero Berounka. Informoj: www.kava-pech.cz/ekotur

**8.-15. 6. 2006 La 59-a Kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)** en la grava pilgrimloko Velehrad (suda Moravio). Specialan programon por junuloj organizos ĈEJ. Informoj: www.ikue.org aŭ http://mujweb.cz/Spolecnost/Svacek, pri la junulara programo ikue@blahus.cz

**2.7. – 15.7. 2006 La 1-a etapo SET Lančov (**esperanto.trebic@volny.cz)

**16.7. – 29.7. 2006 La 2-a etapo SET Lančov**

**30.7. – 12.8. 2006 La 3-a etapo SET Lančov**

**12.8. – 13.8. 2006 Renkontiĝo de eksaj tendaranoj**

**12.-19. 8. 2006 La 56-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI)** en la vilaĝo Strážné (la montaro Karkonoŝo, nord-orienta Bohemio). Informoj: cea.polnicky@quick.cz

**15.-29. 6. 2006 La 28-a Renkontiĝo de Esperantaj Familioj (REF)** en Pilský Mlýn. Informoj:

PavlaDvorakova@tiscali.cz

**Septembro 2006 La asocia konferenco,** verŝajne en České Budějovice

**2.-8. 10. 2006 Internacia Paroliga Semajno (InPaSem) 2006** en la urbeto Dobřichovice (proksime de Prago), en la pensiono Sokol. Informoj kaj aliĝiloj: www.kava-pech.cz/inpasem

**6.-8. 10. 2006 Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI** en Dobřichovice (la lastajn 3 tagojn de InPaSem 2006).

**16-22. 10. 2006 Semajna Lingva Seminario en Skokovy**. Pliaj informoj www.mlboleslav.cz/esperanto aŭ drahotovaesperanto@seznam.cz

**29.9.-1.10. La 18-a Internacia Kultura Festivalo (IKF 2006)** en Ústí nad Labem omaĝe al 100-jariĝo de Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr. Informoj: Miroslav Smyčka, Dlouhá 20, 370 11 České Budějovice aŭ

vlastimil.novobilsky@atlas.cz aŭ kriz.j@kr-ustecky.cz .

**10.-12. 11. 2006 Konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) 2006**
en la urbeto Dobřichovice (proksime de Prago) en la pensiono Sokol. La temo A (ĉefa) estas: Lingvo kaj Interreto, la temo B: Studoj el diversaj fakoj. Informoj: www.kava-pech.cz/kaest

**9.12. 2006 La 27-a Ĉeĥa-Saksa Tago**, informoj: Miroslav Smyčka, Dlouhá 20, 370 11 České Budějovice aŭ vlastimil.novobilsky@atlas.cz aŭ kriz.j@kr-ustecky.cz .

# Ni kondolencas

- la 6-an de oktobro 2005 forpasis **Radomil Maudr** el Prago

- la 16-an de oktobro 2005 mortis **Františka Blažková** (90-jara) el Hradec Králové

- la 19-an de oktobro forpasis **Ing. Jaromír Dědina** (81-jara) el Loučím



- la 24-an de septembro mortis **Ing. Blahoslav Štefek** (72-jara) el Polička, multjara prezidanto de la loka klubo



- la 13-an de novembro forpasis **Jan Rybář** el Ostrov n. O. (76-jara), aŭtoro de la fama *Terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj*

## GRANDA VERKISTO KAJ ESPERANTISTO FORPASIS

Unu el la plej gravaj kaj popularaj ĉinaj verkistoj de la 20-a jarcento, la veterana esperantisto **Bakin** (Ba Jin; origine Li Feigan) forpasis la 17-an de oktobro. La 25-an de novembro li estus 101-jara. Bakin aktivis en la Esperanto-movado ekde la 1920-aj jaroj, kiam li ankaŭ tradukis el Esperanto al la ĉina verkojn de E. Amicis, A. Tolstoj kaj Akita Ujaki. En 1932 li ĉinigis la romanon "Printempo en aŭtuno" de Julio Baghy. Ĝi forte tuŝis lin kaj inspiris lin verki ĉinlingve sian propran romanon "Aŭtuno en la printempo", kies Esperanta traduko aperis en 1980. En Esperanto aperis ankaŭ liaj romanoj "La familio" kaj "Frosta nokto".

## Franko Luin (1941-2005)

pioniro de Esperanto-movado en la interreto forpasis la 15-an de septembro. Li prizorgis informejon **NUN** kaj bibliotekon **eLibrejo**.

# Rekonstruado de Lančov

La necesejoj kaj lavejoj jam estas preskaŭ finkonstruitaj, oni devas ankoraŭ puci (ŝmiri per mortero) la murojn de la knabaj ĉeloj kaj kovri la tutan konstruaĵon per nova tegmento. Tiu estos tiel larĝa, ke ĝi ŝirmos ankaŭ la irejon ĉirkaŭ la dometo, por ke ĝi estu seka eĉ dum pluvo. Kaj por ke oni povu facile iri plenumi siajn higienajn bezonojn, oni jam komencis konstrui grandajn ŝtupojn sur la glitiga deklivo.

Al la klubo de Třebíč aliĝis 31 junaj lanĉovanoj (el la kursoj de Esperanto, angla kaj germana) kaj formis tiamaniere kluban junularon, kiu ĝuos avantaĝojn kompare al neklubanoj.

La klubo volas samtempe gratuli al la malnovaj lančovanoj, kiuj dediĉis al la tendaro parton de sia vivo, postlasis grandan laboron kaj ĉijare festas siajn gravajn vivjubileojn: temas pri gesamideanoj **Lada Bala, Karel Franc, Olga Sittauerová** kaj **Dieter Berndt**.

# ĈEA-retkomunikoj

Jam tri jarojn estas dissendata neregula senpaga reta informilo de ĈEA "ĈEA-retkomunikoj". Se vi estas rete konektita kaj tamen ne ricevadas ĝin, vi povas legi ĉiujn dissenditajn retkomunikojn sur http://www.esperanto.cz.

Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn, do neniukaze ĝenas per sia "pezeco" kaj ĝia ofteco estas ne pli ol 5 jare. Se vi deziras ricevadi ĝin rekte en vian retkeston kaj esti aktuale informitaj, bv. sendi vian peton kun via retadreso al info@esperanto.cz aŭ chrdle@kava-pech.cz

# Jak platit svazu

V kterékoliv pobočce Poštovní spořitelny a ve většině poboček České pošty si vyžádáte tiskopis VKLAD, který vyplníte ve všech kolonkách: **částka Kč** - sumu, kterou platíte, **č. účtu:** 195 230 825/0300, **variabilní symbol**: má celkem 10 kolonek - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (je uvedeno na adresním štítku při expedici Starta) a dalších pět pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte svoje číslo legitimace a pošlete tajemníkovi seznam, za koho platíte. **Symbol konstantní** je 0379 a **název účtu** je: Český esperantský svaz. Stejná čísla uveďte na ústřižek, který slouží jako doklad o platbě. Platba je bez poplatku. **Na starý účet u KB již nic neplaťte!!!**

Seznam čísel (variabilní symboly):
**06940** členství ČES
**06941** členství UEA
**06942** předplatné Starta bez členství
**06943** dary ČES
**06944** zápisné do Odborné knihovny ČES
**07001** předpl. Monato (650,-Kč)
**07002** předpl. La Gazeto (650,- Kč)
**07003** předpl. La Ondo de Esp-o (500,- Kč)
**07004** předpl. Juna Amiko (300,- Kč)
**07005** předpl. Literatura Foiro (970,- Kč)
**07006** předpl. Heroldo de Esp-o (1030,- Kč)
**07007** předpl. Femina (650,- Kč)
**07008** předpl. Litova Stelo (320,- Kč)
**50200** sekce železničářů IFEF
**50400** komise pedagogická ILEI
**50401** písemný kurs začátečníci
**50402** písemný kurs pokročilí
**50404** Paroliga kurso
**50405** svazové zkoušky
**50800** sekce nevidomých LIBE
**50900** sekce zdravotníků UMEA
**51000** sekce křesť. esp. KELI
**51100** sekce katol. esp. IKUE
**51200** sekce informatiky
**70100** komise pro tisk a inf.
**80200** ediční fond
**80300** propagace v tisku
**80400** fond Tilio

# Zájemci o časopisy,

pište na adresu nového peranta: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz. Způsob placení najdete v levém sloupci této strany.

**Monato:** 650,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4
**La Gazeto:** 650,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5
**La Ondo de Esperanto:** 500,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4
**Juna Amiko:** 300,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 32 stran formátu A5
**Litova Stelo:** 320,- Kč, v.s. 07008, 6 čísel ročně, 36 stran formátu A5
**Literatura Foiro:** 970,- Kč, v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5
**Heroldo de Esperanto:** 1030,- Kč, v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3
**Femina:** 650,- Kč, v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A 4

**Periodikum Českého esperantského svazu (36. ročník)**

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**malovec@volny.cz; http://members.chello.cz/malovec/**

**Členská evidence a změny adres:**

**c/o Pavel Polnický, ČES, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, cea.polnicky@quick.cz**

**Uzávěrka dalšího čísla**: 1.2.2006

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (36-a jarkolekto)**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 2 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,**

**Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, e-mail: malovec@volny.cz;**

**http://members.chello.cz/malovec/**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero**: 1.2.2006

**ISSN 1212-009X**

## Donaco de gazetoj

Kiu deziras gazetojn *Esperanto 1994-2005* kaj *Monato 2002-2005* kontraŭ negranda pago, skribu al Fr. Šťovíček, Šimkova 370, 500 03 Hradec Králové, tel. 731 877 223.

## Esperantský silvestr

se koná 29. 12. 2005 v klubu Horbytka v České Třebové. Cena vstupného včetně večeře je 190,- Kč. Přihlášky zasílat na Svatopluka Čecha, Javorka 980, 560 02 Česká Třebová, telefon: 465 532 788. Ubytování je možno domluvit na ubytovně ČD.

## Esperanto-televido jam funkcias!




Ekde la 5-a de novembro la televido jam elsendas regule diversajn dokumentojn, kurson *Pasporto al la tuta mondo* kaj ankaŭ kinofilmojn. La reta adreso estas **http://internacia.tv/**.